

Heinrich Heine, [Ne scias mi, kio okazis]	Heinrich Heine, Lorelay	Heinrich Heine, The Lorelei	Heinrich Heine, The Lorelei
<i>tradukita de Paul Gottfried Christal- ler</i>	<i>tradukita de Hans- Georg Kaiser</i>	<i>tradukita de L. W. Garn- ham</i>	<i>tradukita de Mark Twain</i>
<i>El la "Libro de la kan- toj", parto "La Reve- no".</i>			<i>An ancient legend of the Rhine</i>
Ne scias mi, kio oka- zis al mia tristema kor': Antikva legendo min kaptis, ne cedas el mia me- mor'.	Min kaptas malgaj' en la koro, pro kio tia trist'? Fabel' el antikva fo- ro ne lasas de mi kun persist'.	I do not know what it si- gnifies. That I am so sorrowful? A fable of old Times so terrifies, Leaves my heart so thoughtful.	I cannot divine what it meaneth, This haunting nameless pain: A tale of the bygone ages Keeps brooding through my brain:
La Rejno fluadas trankvile murmuras kiel mi- ster', la supron ŝtonegan orumas sunbriloj de la ves- per'.	Aere fridetas, trank- vilas, malhelas jam la Re- jn'. La monto surpinte brilas vespere en rava scen'.	The air is cool and it dar- kens, And calmly flows the Rhine; The summit of the moun- tain hearkens In evening sunshine line.	The faint air cools in the gloaming, And peaceful flows the Rhine, The thirsty summits are drinking The sunset's flooding wine;
Plej bela virgino jen sidas mirinda sur la mon- tet' kaj ŝia oraĵo radias, ⁴ ŝi logas kiel ma- gnet'.	Tre ĉarma feino si- das, jen supre por ador'; la ora ornamo ridas; ŝi kombas harojn el or'.	The most beautiful Mai- den entrances Above wonderfully there, Her beautiful golden at- tire glances, She combs her golden hair.	The loveliest maiden is sitting High-throned in yon blue air, Her golden jewels are shining, She combs her golden hair;
...

⁴En la sube menciita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

Ŝi kombas la oran hararon abundan per ora kombil', kantante misteran lidon, ⁵ ravantan kiel sun- bril'.	Ŝi kombas per ora kombilo kaj kantas kun pasi'; mirigas min la elbri- lo kaj forto de l' melo- di'.	With golden comb so lu- strous, And thereby a song sings, It has a tone so won- drous, That powerful melody rings.	She combs with comb that is golden, And sings a weird re- frain That steepes in a deadly enchantment The listener's ravished brain:
Ŝipisto en sia ŝipeto kaptiĝas per stranga dolor', la rifon li tute igno- ras. atentas nur ŝin kun fervor'.	Ŝipisto ŝipeton gvi- das, lin kaptas ve' de ek- zalt'. Li ja la rifojn ne vi- das', li vidas nur supren sen halt'.	The shipper in the little ship It effects with woe sad might; He does not see the rocky slip, He only regards dreaded height.	The doomed in his drif- ting shallop, Is tranced with the sad sweet tone, He sees not the yawing breakers, He sees but the maid alone:
Mi kredas: la ondoj englutas ⁶ ŝipiston, ŝipeton je l' fin', kaj kulpa pri tio nur estas kantado de la virin'.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eli- ras de Lorelaj-siren'.	I believe the turbulent waves Swallow the last shipper and boat; She with her singing cra- ves All to visit her magic moat.	The pitiless billwos en- gulf him!- So perish sailor and bark; And this, with her bale- ful singing, Is the Lorelei's gruesome work.
...

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 - †1950-12-31).

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas mal-supre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)